

**ELDONANTOJ**  
 ĝojus, se alvenus ankoraŭ  
 1905 novaj abonantoj el Bou-  
 logne, 1906 el Genève, 1907  
 el Cambridge, 1908 el Dres-  
 den, 1909 el Barcelona, 1910  
 el Washington, 1911 el Ant-  
 werpen, 1912 el Krakow, 1913  
 el Bern, 1914 el Paris, 1915  
 el San Francisco, 1920 el  
 Hago, 1921 el Praha.

**ĈEF-REDAKTORO** ĝojus,  
 se ĉiuj manuskriptoj estus  
 tiel bone verkitaĵ, ke li ne  
 bezonus korekti ilin.

# ESPERANTO

## TRIONFUNTA

**ADMINISTREJO:**  
 Köln, Harem, Reinlando,  
 Germanio/landiuj.

Manuskriptoj oni skribu ne  
 nur sur amaraĵo flankoj de l'  
 papero, sed — se eble —  
 ankaŭ laŭlonge de la supra,  
 malsupra, dekstra kaj mal-  
 dekstra marĉenoj. Skribu  
 ĉion plej malklare, neniam  
 per maŝino. Forgesu ĉiam  
 aldoni resp. kup. aŭ pm.  
 Neniam afranku suĉte por  
 ne senigi nin de la ĝojo  
 pagi punon.

**ABOMENEJOJ**  
 ekzistas en multaj landoj. Abomenoj pri ET akceptas  
 ankaŭ la Viro en la Luno, f-ino Venuso kaj la poŝt-  
 veturistilo sur la Lakta Strato.

En multaj urboj ET estas poekzemple aĉetebla ĉe  
 publikaj lokoj.

Komercestaj ĉambristinoj favoraj al Esperanto ricevas  
 senpage kisojn de vojaĝantaj Esperantistoj por propa-  
 gandaj celoj (komparu ET, n-o 58, pg. 2, kol. 4).

**Aperas semante.** JARO BONA. **Aperas ĝemante.**  
 Amerikkontinentiuj, Grandbritlandiuj, Danmarklandiuj, Holnederlandiuj kaj ĉiuj  
 aliaj bonvalutaj landiuj ricevas por jaro 52 numerojn de ET: Ĉeĥoslovaklandiuj,  
 Finnsoomlandiuj, Germanio/landiuj kaj aliaj mezbonvalutaj landiuj po duonjaro  
 26 numerojn; Aŭstralandiuj, Hungarlandiuj, Pollandiuj kaj aliaj malbonvalutaj  
 landiuj po kvaronjaro 13 numerojn; Sovjetruslandiuj kaj Utoplandiuj po semajno  
 1 numerojn. Unuopa numero kostas en ĉiuj landoj unu demand-kuponon. — Oni  
 abonu ĉe niaj abonejoj (vidu maldekstre) aŭ rekte ĉe la Senarmiga Konferenco  
 en Vaŝingtono sub jaro 1922, komplementa kajejo Kanoso, aldono Ĝenovo (ĉiu  
 numero bandedolita per papero).

**ANONCOJ**  
 por la hodiaŭa numero ne estas akceptataj. — La prezo  
 de la anoncoj po cm<sup>2</sup> oni kalkulu laŭ jena ekvacio:  $px^1 = (a-b) \times \log n^2 + r$ , ĉe kiu signifas: p = prezo, x = dato  
 de la proksima kongreso, a kaj b = nombro de loĝ-  
 antoj de la urboj proponitaj por la proksima kongreso,  
 n = situo de l' antaŭa kongreso super mara nivelo en  
 metroj, r = nombro de abonantoj de ET. — ANONCETOJ  
 estas presitaj sur la lasta paĝo de la gazeto.

**Numero 73 :-: Edinverpen, Panas, Barlin, Köszawa, Hengeburgh, Antlo, Warcelona, Kaŭris :-: 26. Febr. 1922.**

## Nia NDKIXF-a, la Interplanedara Kongreso.

La aktualeco de nia ĵurnalo jam estas proverba.  
 Ni dankas ĝin plejmulte al regula kunlaboro  
 de multaj el niaj abonantoj kaj legantoj. Sed  
 la ĝisnuna sukceso ne igis nin ripozi sur niaj  
 laŭroj. Ĉiam pliperfektiĝi nian ET-on ni daŭre  
 klopodas, kaj uzante la plej novajn progresojn  
 de tekniko kaj scienco, kaj ne ŝparante tempon  
 kaj monon ni troviĝas jam hodiaŭ en la bonega  
 situacio, doni al niaj amikoj la raporton pri la  
 NDKIXF-a Kongreso, la „Interplanedara“, kiu  
 okazos sur la Marso. Bonaj rilatoj al la vic-  
 prezidanto de la spiritualiza klubo ebligas al ni  
 tion. Ĉi tiu klubo flekas spiritisman pliperfektitan  
 en tiu grado, ke bona mediumo povas antaŭscii  
 okazojn jam kelkajn miljarojn antaŭe.

El la ampleksa raporto, kiun ni ricevis pri la  
 kongreso, ni jen publikigas ekstraktan, kiu donas  
 sufiĉe klaran bildon pri la grava okazantaĵo.

La movado tiam jam disvastiĝis sur la Tero  
 kaj sur la planedoj Marso, Saturno, Neptuno kaj  
 Venuso. Sur la Luno, kiu antaŭe estis senhoma,  
 oni fondis kolonion pure Esperantistan, kaj la  
 Esperantistoj tieaj, kiuj uzis Esperanton sen ia  
 nacilingva influo, estis rigardataj kiel la plej lertaj  
 kaj Fundament-fidelaĵ. Tial oni ankaŭ interkon-  
 sentiĝis dum la antaŭa kongreso sur Venuso, ke  
 la Lun-Esperantistoj estu ĉiamaj L. K.-anoj kaj  
 Akademiuloj. „Lingvo Internacia“ estis redaktata  
 sur Neptuno kaj farigis regula aldono al ET, kiu  
 ricevis la sceligon de Neptuno per senfadena holo-  
 fono. Nia dua bildo montras la gigantajn  
 antenonon, kiuj estas en Horrem sur specia teri-  
 torio 17,29429 km. larĝa kaj 79,01234 km. longa.

La kongresanoj vojaĝis en du karavanoj  
 el Horrem al la Marso. La unua preferis la  
 pli interesan sed ankaŭ pli longan vojaĝon per  
 la „Flupido“. Oni tiam estis eltrovinta novajn  
 radiojn, kiuj en montrita direkto foriris kaj kiuj  
 havis la forton, kunpreni kun si korpojn el la  
 Fundamento „Malpezon“, pli daŭra ol la Fun-  
 damento kaj tamen malpli peza ol ĉiuj ĝis nun  
 konitaj aliaj metaloj. Sed la unuaj vojaĝoj montris,  
 ke la tro granda rapideco de la flugo malbone  
 influis la nervojn de la vojaĝantoj. Post kelkaj  
 eksperimentoj oni sukcesis, per certia varmeko

### Haludzinspiritisma vojaĝo de Tero al Marso.



**Transmaterializacio**  
 (Dematerializacio kaj rematerializacio) de  
 579 246 gesamideanoj dum 1/3407689 sekundo.  
 La neŭtralaĵo por la multaj transmaterializoj estis tiel  
 granda, ke terloĝantoj, ne sciantes pri la okazo, opiniis  
 ĝin komitovosto. (Pli detalajn klarigojn bonvolu legi  
 en la teksto.)

kurbigi la radiojn spiritelektrajn, tiel ke la mal-  
 pezona korpo povas flugi interne de la spiralo,  
 kiu estas formita de la tiel nomita spirada energio.  
 Per la Flupoid-meŝino, kiun niaj legantoj povas  
 vidi sur la dua bildo, oni povas atingi la dimensio-  
 n de la spiralo kaj per tio adapti la flugrapidi-  
 econ al ĉiuj dezirataj bezonoj. Por la vojaĝo al  
 la Marso oni konstruis ĝin tiel, ke la vojaĝo  
 daŭris 9 monatojn, 11 tagojn, 17 horojn, 32 mi-  
 nutojn kaj 13,4 sekundojn, kiun rapidecon oni  
 estis eltrovinta kiel plej komfortan por normalaj  
 homoj, ankaŭ tiam troveblaj inter la Esperantistaro.

La karavanoj gvidis s-o d-ro Parvit, kiu  
 pro siaj bonaj rilatoj al la Ligo de Planedoj

kaj kiel intelekta gvidanto de la interplanedara  
 Esperantistaro ŝajnis plej taŭga por tiu ĉi tasko.  
 Helpis lin lia filo Karlo kaj iies edukisto Eko,  
 kiu por valutaj cirkonstancoj venis el Berlin. La  
 originala bildo, kiu kuŝas antaŭ ni, estas farita  
 per la elektrospiritalrapidokinetografon kaj  
 montras ĉion en natural koloroj, tiel ke oni povas  
 bone kiti la vizaĝojn de la kunvojaĝantoj, kiuj  
 tra fenestroj elrigardas el la „Flupajo“. Se oni  
 enmetas la filmon en specialan aparaton, oni  
 povas klare aŭdi la brulon, kiu estiĝas, per la  
 flugo de la flupajo. Oni eĉ povas aŭdi, ke la vo-  
 jaĝantoj kantas la unuan strofon (jam trian fojon)  
 de la himno. Alian samideanon oni aŭdis post ĉiuj

strofo kanti la rekanton: „Restu vi fidelaj el la  
 Fundamento!“, dum alia daŭre klarigis al la  
 gesamide-o-e-c-a-an-ul-a-o-j la principojn de la  
 vortfarado en Esperanto. Pluaj samideanoj rak-  
 ontis verajn „travivaĵojn“ aŭ priskribis, „kiel  
 ili farigis Esperantistoj“.

Entute la flupajo transportis 18 127 Esperant-  
 istojn. Kvankam ĝi estis konstruita nur por 18 000  
 pasaĝeroj kun pakajo, oni povis fari escepton kaj  
 kunpreni la kelkajn pli, ĉar multaj el la Esper-  
 antistoj vojaĝis sen ĉapelo, kolumo, gantoj kaj  
 cetera pakajo, tiel ke estis ŝparita multe da pezo.  
 Eĉ iu „larĝa maso“ povis partopreni je ĝojo de  
 saksa samideano, kiu preskaŭ ne plu retrovis  
 sian voĉon, perditan en Max & Morisstrato dum  
 la nokto antaŭ la forvojaĝo.

Ke la flupajo portis specialan antenon por resti  
 en konekso kun ET, tio ne bezonas esti speciale  
 dirata.

La dua karavano uzis pli modernan okazon  
 por veni al la Marso. La partoprenantoj utiligis  
 la plej novajn progresojn de la haludzinspirit-  
 ismo. Laŭ tio ili estis dematerializitaj sur  
 la Tero kaj rematerializitaj sur la Marso,  
 kio bezonis nur 1/3407689 de unu sekundo. Tamen  
 la supre jam menciita elektrospiritalrapidokine-  
 tografo kun speciala aranĝo por grandaj di-  
 stancoj ebligis, fari sufiĉe klaran bildon de ĉi tiuj  
 dematerializacio kaj rematerializacio. La aparato  
 por tio staris sur la Luno en unu el la grandaj  
 krateroj, por forigi de ĝi la venton, kiu sur la  
 Luno tiam ne plu estis „facila“. La blanka ne-  
 bulo sur nia apuda bildo montras klare la fakton  
 de la transmaterializacio, kiu okazis sub la lerta  
 kaj sperta direkto de nia franca samideano s-o  
 Tiedald. 579 246 surteraj Esperantistoj sam-  
 tempe estis transmaterializitaj. Pro la mallonga  
 daŭro de la „vojaĝo“ la karavano ne bezonis  
 gvidanton. Ĝi ankaŭ foriris el Horrem, kaj kun-  
 preneble partoprenis ankaŭ nia ĉefredaktoro kun  
 siabo de 359 kunredaktoroj, 47 administrantoj,  
 17 sekretarioj, 84 kunlaborantoj ktp. Laŭ la rap-  
 ortoj, kiuj estis legebla en la tiam jam 12-foje  
 po tago aperanta ET (la nomo ŝanĝiĝis en  
 ESPERANTO TRIUMFANTA), ĉiuj partoprenintoj

### La Senfinulo.

Rekanto de S. Kri. B. Spasmulo.  
 Trastudita sensukeco de la verkinto.  
 Rekomendita al la bonvojo de la legantoj.  
 (987-a daŭrigejo.)

Kaj pensinte tion, li ekstaris ne turnante la  
 rigardon de la bela knabino, kiu senmove staris  
 antaŭ la fenestro de la luksa apartenanta al sia  
 patro domo, kiun li estis konstruita jam en antaŭ-  
 milia tempo, kiam la knabino apenaŭ havis du  
 aŭ tri jarojn, kaj en kiu li ankoraŭ felice vivis  
 kun sia edzino, kiun poste tiel baldaŭ forprenis  
 la severa morto, ĉar jam de infaneco ŝi portis en  
 si la semon de la terura malsano, kontraŭ kiu  
 ĝis hodiaŭ ĉiuj scienculoj montris sin malfortaj,  
 kvankam la progresoj de la scienco preskaŭ neniam  
 haltis antaŭ iu malfacilaĵo aŭ baro, kiel oni  
 ja bone povis vidi ĉe la aerŝipveturado, kiun  
 multaj personoj timemaj opiniis danĝera aŭ al-  
 menaŭ malsaniga, kvankam la ĉiutaga sporto  
 tion malpravigas eĉ en tia grado, ke pli kaj pli  
 oni uzas aerŝipojn por regulaj servoj, kiuj estis  
 ĝis nun plenumitaj de la konataj fervojoj aŭ aŭto-  
 mobiloj, kiuj lastaj antaŭ la fervojoj havas la pre-  
 teron, ke ili estas sendependaj de fiksaĵoj kaj  
 povas atingi preskaŭ ĉiun lokon, kiun povas  
 atingi homa piedo, tiel ke oni eĉ jam prenas  
 la eblon traveturi la ĝis nun preskaŭ nesplor-  
 itan dezertojn Sahara, kiu estas preskaŭ same  
 nekona, kiel la stranga lando Tibetio, en kiun  
 nun estas sendita esplora karavano, por suriri la  
 proksiman Mount Everest, la plej altan monton  
 de la mondo, tiel alta, ke nia plej granda fanta-  
 zio ne povas imagi ion simile aln, kvankam  
 simileco ja estas nur relativa, sed relativa sen iu  
 kontakto al la teorio de profesoro Einstein, kiu  
 antaŭ kelka tempo vojaĝis Amerikon kaj tie estis

akceptata kun plej grandaj honoroj kaj aplaŭdo  
 okaze de la publika parolado, kiun li tiris antaŭ  
 publiko ĝesinjora, ĉar ja en Ameriko la virinoj  
 jam delonge ludas rolon publikan pli grandam ol  
 en Eŭropo, kie en antaŭa tempo oni rigardis la  
 virinojn sklavinojn de la familio aŭ almenaŭ de la  
 viron, ĉar li okupis sin ĝenerale pri ĉasado de  
 soveĝaj porkoj, cervoj, leporoj aŭ bestoj, kiuj nun  
 ne plu ekzistas aŭ almenaŭ estas troveblaj nur  
 en zoologiaj ĝardenoj, por tie estis montrataj je  
 sufiĉe alta enirprezo, el kiu la urboj kiel posed-  
 antoj de la plejmulto el ili ofte havas sufiĉe  
 grandan enspezon, per kiu ili povas parte egali  
 la budĝeton ŝarĝitan per elspezoj por higieno,  
 sporto aŭ aliaj modernaj movadoj, kies gravecon  
 neniu povas ne, kiu marŝas kun la nuntempa  
 kulturo tiel reala, ke preskaŭ ne restas tempo por  
 iu ideala faro al homo, kiu sukcesplene volas ba-  
 tali la batalon pri ekzistado, tiel multe priparol-  
 itan de filozofoj, el kiu sufiĉe multaj atingis  
 mondan famon, kaj al kiuj oni metis monum-  
 entojn en grandaj kaj malgrandaj urboj subten-  
 ente per tio samtempe skulpturistojn kaj aliajn  
 reprezentantojn de la figura arto, kiu ĝoigas la  
 homan koron ofte pli multe ol ĉarmaj valoj kaj  
 misteraj arbaroj, el kiu la homoj prenas la lignon,  
 serĉas la berojn tiel bongustajn por refreŝigi mal-  
 sanulon en lito kuŝantan kaj ne vidantan la fe-  
 liciton de la junaj gelemoj, kiuj iras al la preĝejo  
 por ricevi la geedzigan benon de la maluna  
 pastro en ĉeesto de la felikaj gepatroj de la fianĉ-  
 ino, kies patro akiris siejn milionojn por la kon-  
 struado de la giganta ponto trans la golfo de  
 M., en kiu ĉiutage centoj da ŝipoj alvenas por  
 preni komercetojn, fruktojn, metalojn ktp., nehav-  
 eblajn en aliaj landoj, kien oni povas transporti  
 ilin, se la limdepaĝoj ne estus tiel altaj, nur tial,  
 ĉar la polihiko tion postules en intereso de kelkaj

specialaj komercistoj, kiuj havas grandegajn aŭto-  
 fivojn, eĉ en tia grado, ke ili povas aĉeti aŭto-  
 mobilojn ofte pli grandajn ol necese, se oni  
 konsideras, ke la policaĵ leĝoj malpermesas tro  
 grandan rapidecon, kiu preskaŭ ĉiam portas  
 danĝeron en la vivon de la grandurbo, kiu mal-  
 graŭ ĉio de multaj personoj estas pli multe ŝatata  
 ol vilaĝo, malgraŭ tio, ke ovaj jam nun estas unu  
 el la plej kostaj nutraĵoj kaj tre ŝarĝataj de  
 junaj personoj sed eĉ de maljunaj, kiuj hodiaŭ  
 atingas pli grandan aĝon ol nur kelkajn jardekojn  
 antaŭe, kiam ne jam ekzistis fervojoj aŭ aŭto-  
 mobilaj omnibusoj, kiuj tiel malgravebligas la  
 migradon sur la stratoj dum ĉiuj sezonoj, el kiuj  
 preĉpe la printempo estas prikanita de poetoj el  
 ĉiuj landoj, kiu konas severan vintron, la sezonon  
 de la kristnaska festo, je kiu la homoj ĝoigas  
 unu la alian per donacoj multspecaj, kiujn ili parte  
 mem faras, ĉar tio ĝenerale pliĝoigas la donacitojn  
 ol preciozaj objektoj aĉetitaj en la vastaj  
 bazaroj trovigantaj en la grandurboj, kiuj dum la  
 lasta jarcento en ĉiuj industriaj landoj kreskis el  
 la tero kvazaŭ fungoj, volonte kolektataj de multaj  
 personoj — junaj kaj maljunaj — en la arbaro,  
 plej ofte post pluvo, poste kuirataj kaj mangataj  
 kun granda apetito kiel delikataj bongustiaĵoj, al  
 kiuj oni atribuas ankaŭ kaviaron, ostrojn, k. s.,  
 kies ĝuado tamen povas permesi al si kufime  
 nur rikiuloj por ilia multekosteco, kvankam nun-  
 tempe post la terura milito — ĉio estas tiel  
 multekosta, ke eĉ malpli delikatajn mangajojn, al  
 kiuj oni en antaŭmilita tempo jam kutimiĝis, oni  
 devas rezigni, al kio en multaj landoj venas an-  
 koraj la mizera stato de la valuto, ekzemple en  
 Ruslando, tiel ke por unu angla pundo oni jam  
 pagas luten milionon da rubloj — sumon, kiu  
 iam prezentis princaĵon havaĵon, sed per kiu hodiaŭ  
 oni povas apenaŭ aĉeti kompletan vestaĵon, in-

diferente ĉu por viro aŭ virino, kvankam oni  
 devas konfesi, ke virino ĝenerale portas pli multe-  
 kostajn vestaĵojn kaj pli valorajn ornamaĵojn, pre-  
 cepo el oro, arĝento, sukceso aŭ perloj, aŭ dia-  
 mantoj, aŭ eburo, kiun oni ĝojnas el la dentoj  
 de elefantoj ĉasataj de kuraĝaj ĉasistoj en Afriko  
 aŭ en Hindujo, jena lando konata per ĝia admir-  
 abla tropika naturo, ĝiaj vastegaj praarbaroj, ĝiaj  
 beleĝaj kaj bonodoraj floroj, ĝiaj sovaĝaj sed  
 fion pli interesaj bestoj, por ĝiaj miraklaj kon-  
 struaĵoj, por la riĉeco de ĝiaj princoj, t. n.  
 rajajtoj, ĉar ĝia kulturo estas jam tre malnova,  
 simile al tiu de l' antikva Egiptujo, per kies  
 kolosaj piramidoj, misteraj sfinksjoj kaj potencaj  
 infanoj kaj legante en la Biblio, kiun cetero tra-  
 dukis d-ro Zamenhof en modernestlan Esperanton,  
 kvankam tiu ĉi laboro ne estis facila kaj bezonis  
 multe da tempo kaj pacienco, por ke ĝi estu plej-  
 eble perfekta kaj inda ero de la Esperanta litera-  
 turo, kiu iam estis tre malampleksa, sed hodiaŭ  
 jam nombras kelkdekojn da pli multaj gravaj verkoj,  
 verkitaĵ de samideanoj el la tuta terĝlobo, kiu  
 konsistas el kvin kontinentoj: Eŭropo, Afriko,  
 Azio, Ameriko kaj Aŭstralio, kaj el diversaj oceano-  
 aj tranavigataj de miloj da ŝipoj apartenantaj  
 al ĉiuj ŝtatoj kaj portantaj la flagon de tiu ŝtato,  
 al kiu ili apartenas, se oni ne konsideras la rab-  
 ŝipojn apartenantajn al neniu ŝtato, kies anaron  
 oni nomas piratoj, kaj la misterajn „flugantajn  
 holandanojn“, kiuj hodiaŭ kompreneble preferas  
 por siaj flugoj aeroplanojn kiel la alinacianoj,  
 kvankam la aeroplanoj ofte falas en la maron  
 kaj dronas, male de tiuj submarbatoj, kiuj dum la  
 milito tuŝinte minon — krevis kaj aeren flugis  
 tiamaniere renversante la ordon de l' mondo, kion  
 ankaŭ volas la bolŝevikoj, SATanoj, futuristoj kaj  
 la plimulto de la Esp

(Daŭre daŭrigejo.)

trovis la vojaĝon tre agrabla, krom kelkaj, kiuj ricevis kataron (NB! ne kat-aron) pro la tro rapida ŝanĝo de la temperaturo.

Sur la bildo oni per mikroskopo bone povas ekkoni la haludzinspiritisman stacion sur la tero en Horrem kaj sur la Marso apud la Akceptejo. La bildo de la Tero estas tiam neklara, ĉar pro la entuziasmigita „stimungo“ dum la antaŭa kunveno ĉio estis iom nebuliga.

Tuj post la alveno de la du karavanoj, kiuj alvenis kun interspaco de 10 sekundoj, bedaŭrinde montris sin tiu kvankam negrava disharmonio. Preskaŭ la duono de la kongresanoj tuj volis forvojaĝi al kongresoj (kaj tion ankaŭ faris) por kunvoki fakajn kunvenojn kaj starigi fakajn vortarojn ktp. La alia duono sub gvidado de s-anoj Terroc, Trac kaj Reltub elpakis siajn foliojn kaj „fosis sian sulkon“ paralela al la granda kanalo de la Akceptejo ĝis la Kongresujo. Tiamaniere oni ricevis la du kanalojn bone videblajn sur la bildo, el kiuj unu estis uzata por la tienveturo kaj la alia por la reveturo.

Bedaŭrinde ne estis eble, fari bildojn de la kongreso mem, ĉar la aparato sur la Luno englacigiĝis. Kiel oni ja scias, de naturo la Luno estas malvarma. Do oni devis antaŭ la kolonizacio varmigi ĝin. Ĉar la karboj de Germanujo pro konitaj kaŭzoj ne sufiĉis por tio, oni konstruis novan „turbovarmigilon“ sur la Saturno. Tion oni atingis per tio, ke oni haltigis la turnigon de la Saturno kaj lasis turniĝi nur la grandan ringon. Meintente grandajn denirelojn en la internan parton de la ringo oni facile povis konstrui la varmigilon, kiu donis fion da energio, ke ĝi sufiĉis por hejti la Lunon kaj 17 aliajn lunetojn kaj la oficejon de ET. La loĝantoj de la Saturno tiam havis grandan diferencon kun la L. K. kaj kun la Akademio. Ili jam de jaroj postulis la uzadon de io anstataŭ „io“, almenaŭ por sia planado; sed la kompetentuloj sur la Luno obstine kontraŭstaris. Tial la Saturnanoj strikis ĝuste en tiu ĉi por ni tiel grava momento, kaj la Luno restis kelkajn semajnojn sen varmeo. La homoj nur tial ne mortis, ĉar ili daŭre sidis post fermitaj pordoj kaj festene manĝis.

Pri la diversaj aranĝoj de la Kongreso niuj raportistoj diras resume:

En la Akceptejo tuj post alveno de la unuaj kongresanoj el Saturno estis vigla vivo. Baldaŭ la gastoj ne plu povis trovi siajn dokumentojn, ĉar oni ne estis atendinta fion da partoprenantoj. Tial oni vendis la pakojn al la alvenintoj laŭvice, jam antaŭe garantante per fion da la kongreso profiton de 100 000 Spesmilardoj. Kiu en ĉi tiu loterio hazarde ricevis la dokumentaron kun sia kongres-numero, t. e. tiun por li desinitan, havis la rajton senpage partopreni je la ekskurso al la rigardindaj grotjoj sur la Nordpolusa stelo. La felicitaj gajnintoj estis: S-o Plzn el Bierthill, la konata „infanpairo“ Eilthernel Bersik kaj la nelacigebla stelisto (ne ŝtelisto) Rich. Torpe el Sharquay, kiu esperis kiel kelkaj novaj „travivaĵoj“. Per iu ŝajne ne tute honesta aranĝo ricevis sian numeron ankaŭ la konata „Kongresarmulino“ (kongres'ĉarmulino), kiu samtempe festis la jubileon de sia partopreno je la 57-a kongreso interplanedara.


Precize je la anoncita tempo (?) la sekretario de la antaŭa kongreso (sur Venuso) malfermis la kongreson kaj invitis la samideanojn, kanti la himnon. Li konstatis la nombron de la oficialaj delegitoj, kiuj entute estis 9876.

La kompleta listo enhavas 5 592 017 kongresanojn, el kiuj 5598 157 venis de la Tero (el ĉiuj kontinentoj, landoj, ŝtatoj, respublikoj, regionoj, urboj, vilaĝoj, distriktoj, provincoj, departementoj, gubernioj, sendependaj insuloj kaj Danzig). La aliaj venis egalvalde de Venuso, Neptuno kaj Saturno. La Mars-Esperantistoj, kiuj „ne atendis

tion da gastoj“, devis resti for de la kongreso por nesufiĉa grandeco de la kongresujo kaj estis reprezentataj nur de delegitaroj de 50 samideanoj. La Esperantistoj de la Luno ankaŭ ne venis, sed sendis senfadenan salutogramon, kies teksto „Saluton al la kongreso“ entuziasmege estis salutata per kanto de la himno.

La elekto de la prezidantaro de la kongreso donis jenan rezulton: prez. s-o Lokoko, vicprez. s-o Kokoko, sekr. s-o Coo, ĉiuj dumvivaj membroj de la „Marsa Esperantista Internacio“. La unuovota elekto estis salutata per duvoĉa kanto de la himno.

Dum tri tagoj (la Marsa tago daŭris tiam, ĉar la turnigo jam malrapidigis, 77 terajn horojn, 77 minutojn kaj 77 sekundojn) la delegitoj de la diversaj asocioj kaj ŝtataj registaroj ktp. legis siajn salutojn al la kongreso. La pordisto de hazardludoj en Monte Carlo, kiu en la vestejo rapide lernis Esperanton, salutis la kongreson nome de la banko. Lian nur 4-vertan saluton,



La teritorio de ET kun la granda „Flupoido“, konstruita ŝpeciale por Esperantistaj kongresvojaĝoj.

kiu tamen montris la grandan intereson de la internacia entrepreno por nia movado, oni respondis per 68-diversvoĉa kanto de la himno.

Kiel plej gravan punkton oni preparolis la interplanedaran organizacion. Post kiam oni decidis gramotonan ludon de la himno, s-o Seppi prelegis la raporton de s-oj Bueŝist kaj Smoulers, kiun la kongresanoj por laŭta „vivu Esperanto“ krisalutis. Sed tuj levigis s-o Bahai kaj kontraŭparolis el teknikaj vidpunktoj kaj ĉar la financa demando sub nunaj valuto-cirkonstancoj ne ŝajnas solvebla al li, almenaŭ ne dum la nuna kongreso. Kantante la himnon, la kongresanoj entuziasmoplenleĝe salutis la vortojn de Bahai. S-o Hans Josef kiel reprezentanto de A. E. I. O. U. proponis, fondi novan Esperantistan Internacion sub la direkto de A. E. I. O. U. kaj nomi ĝin A. E. I. O. U. A. O. U. Apenaŭ la parolanto finis siajn frazojn, tiam la ĉeestantoj levigis lin sultron kaj portis lin tra ĉiuj ĉambroj de la kongresujo, svingante Esperanto-flagojn kaj kanti la himnon. Reveninte en la grandan salondon, oni aŭskultis la proponon de s-ino Cente el Paris, kiu proponis elekti komisionon de 15 Teraj,

12 Marsaj, 11 Neptunaj, 8 Venusaj kaj 6 Lunaj ganoj, kiuj devas pripensadi la aferon kaj prezenti novan raporton al la 5 venontaj kongresoj. La kongreso decidis laŭpropono.

Dum la oficialaj ĝeneralaj kunvenoj okazis diversaj fakaj kunidoj, i. a. de Eskio, de Jkue, de I. L. E. P. O., de Sato kaj de Malsato, de G. E. A., de B. E. A., de S. F. p. E. kaj de la nove fonditaj I. D. I. O. T. O., I. D. O. kaj A. N. T. I. D. O. Plej grandan rolon ludis la fakaj kunvenoj de A. E. I. O. U., kiuj plendigis ĉiujn tagojn de matene ĝis la festena vespermanĝo. Tiajn oni aranĝis por konservi la demokratian karakteron de la Kongreso en la plej luksaj hoteloj aŭ en la festĉambroj de iuj ambasadoroj. Interalie partoprenis la ĝeneralsekretario de la Ligo de Planadoj, la Sankta Petro, kiu tiam per ripozo loĝis sur malgranda steloto inter Jupitero kaj Urano, Henri Barbussé kun lia amata samideano kaj honora protektoro de la V-a la reĝo de Hispanujo, kaj du aeroplanmondvojaĝantoj, kiuj

kaj la respektindecon de la teknikaj oficistoj de la stacio.

Alia parto de la kongresanoj vojaĝis al la jam menciitaj grotjoj sur la Nordpolusa stelo. Sed la sorto ne favoris ĉi tiun ekskurson. Oni jam forveturis kun malfruigo de 17 horoj, kaj la ĉefkonduktoro de la flupajo ne povis trovi la ŝlosilon por malfermi ĝin. Fine oni ĝin trovis en la poŝo de la konata teknika direktoro kaj eltrovinto de novaj lingvoj-s-o Sauer de Rentre, kiu ne volis doni ĝin, ĉar li ĉiam opinias: ne sufiĉas! Oni baldaŭ povis tranĉvivi lin, asertante ke oni pritraktos la venonta kongreso ian projekton Esperantidato, kaj ricevis la ŝlosilon de li. Ĉiuj flupaj-pasaĝeroj estis en bona humoro, kaj jam ofte oni kantis la himnon, kiam subite post duona vojo la flupajo haltis kaj komencis balanci en la etero. Oni jam timis pri iu falego, kiam alvenis senfadena hologramo sciiganta la pasaĝerojn, ke la Marsa flupoido ne estas tute en ordo, sed ke oni nenion bezonas tiam, ĉar la malpezona korpo estas de plej nova konstruado kaj povas ŝvebi en etero. Pro ĝojo oni kantis la himnon. Ĉiam balancante, la flupajo kvazaŭ pendis en la etero, kaj jam kelkaj pasaĝeroj fariĝis eternalsanaj, kiam subite per forta ekpuŝo la flupajo denove komencis flugi. Sed ĉiun malfelician sekvas plua. Subite la pasaĝeroj vidis apud si stelon ornamitan per multaj pretrestaj flagoj. Estis la nordpolusa stelo! La flupoidmaŝinisto nekorekte direktis la flupajon post la reparado de la flupoido, kaj nun pretreventis la flupajo proksimume 600 km preter la celo. Oni tuj interrilatis kun la Marsa stacio, kaj baldaŭ la flupajo reflugis al la dezirita celo kaj alsteliĝis sur la granda placo signita per verda koloro. Sed nun venis malagrabla surprizo por la ekskursanoj (NB! ekskurs-anoj, ne eks-kursanoj). La L. K. K. antaŭe estis dirinta, ke la veturado kostas nenion, sed nur la alsteliĝo 18 Sm. Kompreneble ĉiu pensis, ke 18 Spesmilojn, sed nun oni aŭdis, ke Sm. nun signifas Spesmilardojn. Per afabla reciproka pruntekonado kaj prunteprenado estis eble al ĉiuj gesamideanoj pagi la fion alman, sed tute rajtigitan sumon. Sub normala cirkonstancoj oni certe jam plendus pri mankanta dormo, sed sur la nordpolusa stelo tio ne estis sentebla, ĉar la tago tie ja daŭras duonan (interplanedaran) jaron. Tamen pro la diversaj prokrastoj la karavanoj estis iom lacaj, ĉagrenigis pri la malbona aranĝo de la ekskurso kaj laŭte mallaudis la L. K. K. Precipe oni aŭdis s-o'n Fr. Wisman (kongresnumero E. K. O. 46. S. 59), kiun la L. K. K. estro tiam nomis „sovinisto“ — vorto, kiu tiam estis unu el la plej ofendigaj insultvortoj. Post la rigardado de la grotjo la karavanoj sur la sama vojo revojaĝis al la Marso, kie oni jam delonge atendis ĝin. Preskaŭ ĉiuj kongresanoj restis ekis kunaj. Nur malgrandan aron oni ne povis trovi. Parte ili estis revojaĝintaj al Horrem, ĉar ili sciis, ke la eksperimento de ET dum la daŭro de la kongreso estas sen bofrata kontrolo. Aliaj ŝajnis refreŝigi bonan memoron je la antaŭa kongreso sur Venuso. Tre sekrete ili forvojaĝis — ĉiu sola — al amuzejo sur Venuso, kie ili surprizite renkontis unu la alian. Laŭdire ili tie havis multe da plezuro; sed demandite pri detaloj, ili nur fion ridetis. La belajn fotografiojn, kiujn ili faris ĉe Venuso, ni bedaŭrinde ne povis ricevi por reproduktado, ĉar la interplanedara moral-komisiono konfiskis ilin. S-o d-ro M-r el D. rakontis, ke li dum serioza promenado en publika parko kun

(Ĝen la cenzuristo fortstrekis 5 liniojn)

Ni ankaŭ ne povas represi poemon, kiun s-o Rala (Saaz) en ŝajne tre emocia ĥoro verkis,

\*) Ŝajne eraro en la manuskripto. — Red.)

## Pri la „bona“ stilo en Esperanto.

De Prof. Lingva Konsilisto D-ro log. kaj prec. Hans Wursily-Arlequin, membro de A. C. O., A. D. O., A. J. O., A. N. O., A. R. O., C. J. O., E. B. L. O., ktp.

Iam samideano, kiun kelkaj Esperantistoj nomas bonan stiliston, skribis verketon kun la titolo „Kiel akiri bonan stilon?“. En ĝi precipe estas rekomendite, legi ofte la Esperantajn verkojn de Kabe kaj aliaj komencantoj en Esperanto. La verkinto de la nomita verko laŭ mia scio malokuraĝe sin kaŝas sub la pseudonimo Zanoni, kiu nun fariĝis literatura redaktoro de nia ŝatata ĵurnalo ET. Ĝis nun ni ja povis prave esperi, ke ET ĉiam pli kaj pli disvastigos, ĉar oni certe povis rimarki kelkan emon kontentigitaj la dezirojn de ĉiuj legantoj. Sed de nun — ŝajnas al mi — la afero aliĝos.

Kion Zanoni komprenas „bona stilo“, pri tio vi ja povas informiĝi el la verko mem, kiu tute konforme al amplekso kaj enhavo estas malmultekosta. Zanoni rekomendas kiel imitindan la stilon de Zamenhof, Kabe kaj aliaj Esperantistoj, kiuj uzis tiam lingvon jam antaŭ 50 jaroj, kaj kiuj jam tiam verkis siajn plej konatajn verkojn. Tial stilo, kiu eble sufiĉas por la bezonoj de jama kulturo, nun minacas fariĝi kutima en nia tiel antaŭelcenta ET. Ĉu ni povas fion akcepti sen iu rifuzo?? Ne! Ne! Kaj tian fojon Ne! mi vokas laŭte kaj kredas esti certa, ke ĉiu progresema Esperantisto, ja ĝenerale ĉiu progresema homo konsentas al mi.

Ĉu ekzemple fervoja ministro de iu eĉ plej malgranda ŝtato povas esti homo, kiu plej multe ŝatas la simplecon de poŝkaleŝo? Ĉu poŝmi-

nistro povus esti homo, kiu ŝatas la transportadon de leteroj per piedrantaj viroj? Certe ne! Fervoja ministro devas esti moderna homo, kiu ankaŭ havas intereson por novaj transportiloj, elektraj vagonaroj ktp., kaj poŝministaro devas akceli en kondukton de aerspa poŝto, de senfadena telegrafo, telefono ktp.

Same ankaŭ ni bezonas kiel kunlaborantojn de ET Esperantistojn, kiuj emas al la ĝusta stilo, kiu respondas al modernaj bezonoj, kaj kiu respondas ankaŭ al la algrada spirito, kiu havas plimulto da Esperantistoj (legu la rubrikon „Korespondeo kaj Interŝanĝo“). Sed kia estu tiu „ĝusta“ stilo? Ĉu simila al la simpla stilo de Kabe? — Ne! La stilo, kiun bezonas ni Esperantistoj modernaj, kiun bezonas niaj ĵurnaloj respektindaj, kiu bezonas nia ET, por certigi al si iun vivopovon, devas unuavice esti logika, logika laŭ kvanto kaj logika laŭ kvalito de la enhavo de ĉiuj vortoj aŭ frazo.

Por akiri tian stilon, ni devas elfunde aliĝi niajn opiniojn pri la karaktero de la fundamentaj vortoj, pri vortofarado ktp.

Vi ĝisostuloj ne timu, ke mi atakos la Fundamenton! Neniam! Mi ankaŭ estas ĝisostulo, eĉ ĝisostocerbulato! Sed, ĉar miaj pensoj daŭre okupiĝas pri la Fundamento, mi opinias, ke mi multon komprenis en ĝi, kion plejmulto mi jam komprenis, ĉar ili deflankenigis tro ofte kaj lasis influi sin de nurgŝatitaj fundamentistoj.

Do, trasteĝadante la Fundamenton de komenco ĝis fino, kaj de fino ĝis komenco, plue ĉiujn paĝojn de supraj ĝis malsupraj, kaj de malsupraj ĝis supraj, ĉiun linion de maldekstre ĝis dekstre kaj de dekstre ĝis maldekstre, ĉiun vorton de la unua ĝis la lasta kaj de la lasta ĝis la unua litero, mi ekkonis jenon:

alitis la rigardojn de la kunmanĝantoj por siaj elegantaj fraĵoj kaj bone legitaj menoj, je kio ege kontrastis, ke ili almopzitis benzino por daŭrigi sian vojaĝon. La plej gravaj decidoj tie estas faritaj „inter supro kaj fiso“.

El la amuza parto de la kongreso estas menciindaj:

La ekskurso al la Saturno. Ĉin partoprenis preskaŭ duono de la kongresanoj. Oni veturis per flupajo malvaspirala en tri apartaj karavanoj. Sur la Saturno oni rigardis la grandan observatorion, en kiu estas starigita nova rapidmalproksimendivido, per kiu oni povis ekkoni ĉiun detaligon sur la tero. Kelkaj samideanoj tro scivolemaj observis siajn edzinojn kaj fianĉinojn, sed tre malagrabla surprizito tuj foriris de la instrumento. Aliaj por plezuro rondveturis sur la ringo de la Saturno, kiu donis agrablan okazon rigardi la tutan Planedon el tre proksime, lomi ĝenis la forta vento, kiu estigis per la rapida turnigo. Ankaŭ la energi-stacion, pri kiu ni jam skribis, rigardis la vojaĝantoj. Bedaŭrinde fotografado estas malpermesita de la Interplanedara Alta Teknika Komisiono por ne endanĝerigi la pozicion

En ĉiu radikio de la Fundamento kuŝas nur ideo\*, kvankam tre ampleksa, tamen tre precize definita, sed ĉiam nur ideo sen iu gramatika karaktero. Se la radikioj en la Fundamento havas karakteron substantivan, adiektivan, verban ktp., tio estas nur ŝajno. Se Zamenhof volis esprimi ekz. la „tabl“-a ideon, li povis tion fari nur uzante la esprimojn de la natura simplaj lingvoj, kaj bedaŭrinde en ĉi tiuj lingvoj la „tabl“-a ideo estas esprimebla nur per vorto substantiva. Ĉe kelkaj aliaj vortoj ĉi ja eble povis doni klarigon sen montri iun gramatikan karakteron de la radikio; sed tie la kostoj ludis rolon. La Esperantistoj ne povus aĉeti Fundamenton, kiu fariĝis tro ampleksa sekve de tiaj klarigoj, por kiuj preskaŭ mankas la vortoj en la malriĉaj vivantaj lingvoj. Se oni pripensas, ke la Esperantistoj ne jam povas sufiĉe subteni L. K. kaj Akademion, kiuj devus prilabori la Fundamenton, vi povas esti des pli certa, ke ili ankaŭ ne povus aĉeti la prilaboritan Fundamenton, kiun ni tiel urĝe bezonas.

Do, ĉar la enhavo de ĉiu radikio estas nur ideo, oni devas doni al ĉiu radikio: unue signon de la preciza, kompleta, konkreta enhavo, kaj due signon de la gramatika signifo. Nur per la plej logika sekvo al ĉi tiu principo ni atingos la demeritajn postulantajn stilon, kiu savos la Esperanto-movadon de la perdo. La ĝis nun uzata lingvo eble sufiĉas por traduki la „Struvepetron“ aŭ aliajn por certaj rondaj gravajn verkojn de la gepatro-lingva literaturo, ĝi eble sufiĉas por prilabori la veteron en familia rondo, ĝi ankaŭ sufiĉas por la ideoj en la himno, ideoj, kiuj jam okupas la homojn antaŭ mil kaj mil jaroj. Sed ni modernaj

\*) Iomete jam sentitis ĉi tiun teorion s-o Ĉefeĉ, sed li ne prilaboris ĝin ĝustande.



ĉar — kiel diras la cenzuristo — sklaveco ne plu ekzistas en plejmulto de la surteraj ŝtatoj. Unu el tri samideanoj, kiuj revenis kune de la Venuso kiel lastaj, donis al ni kalkulon, kiun ili ricevis de la ĉefkaterino en la kabaredo „Verda Rato“. Jam la prezoj donas al ni impreson de la cirkonstancoj, sed kiu oni tie ĝuis „arton“. (I spemilmo egale valoras kiel sovjeta rublo). Pro intereso ni reproduktas la kalkulon.

**VENUS Kalkulo.** 437. WRS.

3 buĉoj kun ovoj 12,6000  
3 x fajfaro 29, —  
6 dekduoj de ovoj 465, —  
3 bifstekoj kun or. 960, —  
27 oovorkovajloj 2700, —  
4614,6000

Faksimil-reproduktajo de Venusa restoraci-kalkulo.  
(Oni alentu la malaltan trinkomon, kiu sur Venuso lege povas esti enkalkulata laŭvole dum la adicio.)

Tre ĝojigitaj estis niaj tri amikoj pri tio, ke ili trovis en la kabaredo kiel solan viran artiston la konatan hungaran samideanon Baghosi, kiu en versoj de konata bona kvalito anoncis la prezentadon.

Ni reiru al la kongreso!  
Kvankam la kongresanoj jam estis tre lacaj, ili ankoraŭ multnombre partoprenis en la lasta kunveno, dum kiu oni decidis pri la loko de la venonta 30 kongreso.

Inŭitojn prezentis: la nova grupo en Timbuktuo, la samideanoj de la stelo 7 en la dua sekcio, maldekstra fako, supra parto de la Lakostrato, la Oriono, la Granda Urso kaj diversaj surteraj urboj. Post longa diskutado oni elektis pro valutaj cirkonstancoj Timbuktuo'n sub la kondiĉo, ke internacia bala ne okazos por la armegeco en Timbuktuo kaj pro la vestmodoj, kiuj tie estas. La rezulton de la voĉdonado oni salutis entuziasmigite per kanto de la himno.

Venus la granda momento de la fermo de la kongreso.

Kiel reprezentanto de la prezidanto ŝia senlaca ĉiam freŝa samideano Parviti faris la lastan paroladon de la kongreso. Per vortoj en klasika stilo, kompreneblaj al ĉiu, li akcentis la gravajn sukcesojn dum la kongreso, kies decidoj certe antaŭenpuŝos nian movadon en la tuta mondaro. „La organiza demando,“ li diris, „marŝas kaj marŝas, kaj certe ĝi marŝos, ĝis kiam la lasta homo en la mondaro lernis Esperanton. Tion ni akcelu per ĉiuj niaj vortoj, rezolucioj, kantoj kaj Esperimno! Ĝis revido en Timbuktuo! Vivu Esperanto! Vivu A.E.I.O.U.! Vivu A.E.I.O.U.A.O.U.! Vivu la Ligo de Nacioj kaj de Planedoj! Vivu la Interneta lido kaj la Eterna Paco! Vivu Marŝo!“

Per aplaŭdo, kiam Marsanoj antaŭe neniam jam aŭdis, la ĉestiantaro pruvis sian konsenton al la parolito, kaj emociite de la flama vortoj ili, kante la himnon, forlasis la kongresejon. —

do certe ankaŭ komplikajon\*el ambaŭ, la enfiĝojn, kiuj havas sian nomon de tio, ĉar ili estas en la vortoj anstataŭ antaŭ aŭ post ili. Neŝan pridulu la necesecon de tiaj enfiĝoj. Jam lido montras al ni, ke ne estas parafaj. Ido kondukis nur kelkajn (malmultajn) rilate al la fakta bezono novajn sufiĝojn; sed jam ne estas eble al lidoj, ĉiam trovi la ĝustan sufiĝon. Ili tro multe similas unu al alia. Sed kiujn delikatajn nuancojn oni povus esprimi per plimultigo de -fiksoj, do per enfiĝoj!

Do mi postulas de la Esperantistaro, ke ili akceptu en venonta Kongreso miajn du proponojn, unue pri vortofarado, due pri enkonduko de diversaj laŭeble multaj enfiĝoj.

„Karaĵ“ legantoj! Vi eble miros, ke mi mem uzas nur la ĝisnunan simplan lingvon. Tio okazas nur pro ĝentileco al vi kaj pro modestece de mi. Kompleta gramatiko de Esperanto „moderna“ (la esprimon „moderna“ mi elektis, ĉar „moderna“ ĉiam estas io alia, io alligebila, io pliprekfikiĝebla jam estas preparita de mi. Ĝi ampleksos proksimume 18 vortojn de po 367 artikoloj, unu vorton Esperanto-Esperanto de ĉiuj ideaj vortaroj Esperanto-Esperanto de 31 volumoj de sama nombro de paĝoj, kaj 9 volumojn enhavantajn la kompletan liston kaj klarigon de pli ol 3297 vortoj enfiĝoj, el kiuj la plejmulto ŝajnas al mi neevitebla pro fine atingi logikan (t.e. plej bonan) stilon. Jam kelkaj samideanoj petis de mi po du ekzemplerojn pro recenzo en sia grava, sed pro kostoj nur hektografita ĵurnalo. Kelkaj aliaj volas skribi komplementon. Nur la eldonisto kaj presisto ĝis nun ne jam estas trovitaj. Do mi devas prokrasti la eldonon kaj limigas min je tio, ke mi donas kelkajn ekzemplojn de la maniero, en kiu mi pensas evoluebla nian lingvon.

Pri la revojaĝo ni ne ĝustatempe povis ricevi raporton, ĉar nia medio subite montris ĉiujn signojn de la tiel nomita himnadspasmo. Ni tiel devis interrompi la seancojn, sed esperas povi doni la finon de la raporto en unu el la venontaj numeroj.

Certe niaj legantoj — same kiel ni faris tion — miros, ke la kongresraporto nenion diras pri la salutaraj de reprezentantoj de registaroj. Ni tiel demandis la mediumon kaj aŭdis, ke je la tempo de l' NDKIXF-a ne plu ekzistas registaroj, ŝtatoj, policanoj, leĝoj ktp., sed nur homoj (kaj hominoj). Jen nova finsukceso de Esperanto!

**Foiroj.**

**Grava foiro rekonas la valoron de Esperanto!**  
La oficejo de tre grava foiro (la urbo ne estas nomita, ĉar la aliaj ricevis similiajn leterojn) disponas al ni nun el kelkaj mil leteroj, kiajn ĝi ricevas ĉiutage. Volonte ni represas ĝin laŭvorte, ĉar ĝi montras la grandegan signifon de Esperanto por la komerca vivo.

Kara samedeano Foiro!  
Pardonas, ke mi Vi skribis leterojn per Esperanto, kion mi konas ankaŭ ne tro fluante. Mi havas legita en la gaseto, ke vi bezonas Esperanton, kio estas nia kara lingvo. Mi tre ĝojas al mi, ke mi povas lingvi kun Vi en la bela parolito, kiu estas tre facila lernebla. Mia instruisto ne havas bezonon helpi por mi en la skribo de Esperanto. Vi devas vidi la valoro de Esperanto por vi! Mi volas aĉeti multaj aferoj ĉe Vin. Povas vi sendi al mi tian grandan skatolon, el kia saltas muso, se oni lin malfermadus? Vi devas kompreni ke la teksto ankaŭ devas presita esti per Esperanto; ĉar mi konas tion bone legi. Sendu al mi tre belan, puran, Mia amiko volas ankaŭ aĉetas ian similan, se ti vidinte, ke mi kontentigita estas. Sendu mi ankaŭ vian granda katalogon, kiu estas por legi en la gaseto Esperando Triumfania. Cu placis vi la Esperanto en la tiu gaseto? Mi pensadas, ke la redaktoro devas lerni pli bona nian kara lingvo. Kun kora saluto salutante samedeane via kara Karlo.

PS. Pardonas, ke mi ne tro sufiĉajn markojn alĝuis al la koverton, ĉar la mia patro ne donis al mi la mono. Li diras, ke Esperanto ne taŭgiganta estas. Skribu al lin, ke li aŭdas ion super nia kara lingvo.

(Samideanoj!) Bonvolu traduki ĉi tiun gravan leteron en vian nacian lingvon kaj transdoni al la redakcio de viaj ĵurnaloj, al komercaĵ ĉambroj, al grandaj industrioj kaj komercaĵ firmoj! Vi per tio bone helpos vian propagandajn paŝojn en via urbo. — Red.)

**Lernejo.**

**50 000 infanoj lernantaj Esperanton**  
tuj ekzistus, se nur unu mezgranda grandurbo efektive enkondukus nian lingvon en la urbaj lernejoj. Do la penso pri la enkonduko de Esperanto en la lernejoj devas nin nepe pleniĝi je kontenteco. Niaj perspektivoj por la estonteco estas brilegaj.

**La Altlernejo sur Himalaja Montaro**  
konsentis enkonduki Esperanton nedevige en sian instruplanon tuj, kiam ĝi estos konstruita.

**Bavariaj instruistoj favoraj al Esperanto.**  
En Malpurhaŭsen apud la urbo Pluvkastelo (Bavario, Germ) lernas Esperanton instruisto Lud. Schmidwig. Post la lernado li proponas al la ligo „Punu la lernantojn“ enkonduki Esp. en la lernejoj.

**Enfiĝoj.** Ili povas esti enigataj en iu loko de la radikoj. Kiu unusilaba radikoj povas esti uzata kiel enfiĝo. Laŭ bezono oni elpuŝas literojn ĝis restantaj du. Enfiĝoj por materialo: gno por ligno, fe por fero, pa por papero, to por ŝtono ktp. Do ekzemple la logika radikoj por tabl- el ligno kaj kvar piedoj estas: ta-ka-gno-ilo. Ĉi tiu radikoj estas nur ideo. Por formi el ĝi vorton uzablan, oni devas aldoni la necesajn sufiĝojn, do laŭ la Fundamento: a-jo. La simpla nekompeta kaj ne sufiĉe logika tial ankaŭ ne tute komprenebla vorto „tablo“ de nun estas „takvagnoblejo.“

Kiu ne tuj sentas la preferindecon de ĉi tiu esprimo anstataŭ la longa en Esperanto „simpla“: tablo kun kvar piedoj farita el ligno?? Pluaj enfiĝoj estas por la aneco al la partio, ekz. kio por komunisto, so por socialista, de por demokratia, na por nacia, re por republikana, ktp. Ankaŭ estus necese, havi enfiĝojn, per kiuj oni povas montri, ĉu persono ja estas leĝe punita aŭ ne. Mi proponas la tuj kompreneblajn pu kaj papo. Ĉu oni ne tuj komprenas „Sikonepun-ŝtorlo“ anstataŭ la longa: Sinjoro, kiu apartenas al la komunistia partio kaj ne jam estas punita. Ĉe agoj precipe oni bezonas diversajn enfiĝojn, ekz. ĉe „manĝi“ oni ne scias, ĉu la manĝanto manĝas per kulero, per forko aŭ per la tranĉilo, eble ankaŭ per la fingroj (ĉi), ĉu li manĝas sola aŭ en societo vira aŭ virina, ĉu li trinkas samtempe bieron, vinon, brandon, likvoron aŭ ĉampan-vinon. La koncernaj enfiĝoj estas prenitaj el vortoj mem kaj signifitaj per dikaj literoj. Do neniu plu dubos kio estas: Sikonepunŝtorlo M. tagmakotriavibrandadis ĉe takvagnoblejo en hoĉakveto N. La sama enhavo en Esperanto „simpla“ bezonus jenon: Sinjoro M., kiu apartenas al komunistia partio, kaj kiu ne jam estas leĝe punita,

**Letero el Afrikujo.**

Varmegoza, januaro 1922.  
La tempo, kiam ĉiu internacia vojaĝanto estis sufiĉe bona por nia ujo, por feliĉigi nin, forpasis. Tre multe suferis pro ago kaj maldikeco de la eŭropanoj niaj maljunuloj, kies dentoj jam farigis malbonaj. Sed post la fino de via senenca granda milito la afero en la unua momento ŝajnis reboniĝi. Tamen ni vin devas insiste peti pri tio, ke vi neniam plu sendu al ni ĵurn „idon“. Tiam ne povas digesti eĉ la plej sana viro en nia tuta kontinento. Bonvolu respekti la dezirojn de malgranda nacio.  
Via H. O. M. Oman Ĝulo.

**Scienco.**

**Nova stelo trovita.**  
La profesoro ĉe la Esp. Observaĵejo en Kaunas (Kaŭno, Litovio) d-roj Dom, Klim kaj Dem, plue Naid, Ŝmys kaj Maĉ vidis en la Silvestra Nokto de 1921 al 1922, precize je 12 h., novan stelon sur la ĉielo, kiun ili nomis kiel bonaj patriotoj laŭ sia lando „Litova Stelo“. La lumo de la stelo estas nur malforta; sed oni supozas, ke ĝi plifortigos kun la tempo kaj atingos helecon de „Sirius“.

**La boristaro.**

Ili de nun ĉesis sian laboron, ĉar laŭ Zamenhof guto malgranda konstante frapanta traboras la monton granitan. Ni ĝoje salutas la gravan decidon, kiu donas liberan tempon por propagando de Esperanto. Pro tio ni ankaŭ konsentas al tio, ke la boristoj daŭre ricevas sian ĝisnunan salaĵon.

**U. E. A-on**

ni demandas pri la nomo de la ĉefdelegito sur Marŝo. En la jarlibro por 1922 ni ne povas trovi ĝin. La afero urĝas, ĉar ni por la profito de la NDKIXF-a volas donaci la originalaĵojn de niaj hotaŭtaj bildoj. Supoze UEA ankaŭ povas nomi al ni la nunajn okazojn por sendi la bildojn al la Marŝo.

**Mallongaj Esp. Sciigoj.**

**Britlando.**  
S-oj Rothschild gvidas kurzojn ĉe la Londona Borsu kun bona mona rezultato. Multaj el iliaj lernantoj tamen plendas pri malsukceso, dum aliaj estas plene kontentaj.

**Por la franca nacia Esp. kongreso**  
okazonta en Béziers dum tiu ĉi jaro anoncis s'in inter aliaj tiuj studentoj, kiuj ĝis sialtempe la dolĉajn kisojn de la ĉarmaj kaj amindaj Béziers'aj Esperantistinoj. Certe tia intereso de la franca inteligentularo por Esperanto estas atentinda.

**Esp. kongresoj dum 1922 en Germanlando.**  
La preparoj por la kongreso de Revelo bone progresas. La Hagen'anoj eldonis specialan glumarkon, kiu prezentas unu el la plej belaj fruilingvoj de la urbo, staranta sub akvoduso, — certe tio allogos multajn kongresanojn.

Ankaŭ por la kongreso de GEA en Breslaŭ oni fervore kaj harmoniege laboras. Milleruloj ja forrestas, sed ekzistas sufiĉe da sindonemaj samideanoj por garantiĝi al la kongreso plenan sukceson.

**Italio.**

La eldonantoj de „L' Esperanto“ eltrovis novajn hieroglifojn, je kiuj ili ornamis la kovrilon de la gazeto. Bedaŭrinde la redaktoroj de ET ne havis tempon por lerni la legadon de tiuj ĉi modernaj hieroglifoj; ni rekomendas ilian lernadon al iliaj legantoj.

Ĵagmanĝis, uzante forkon kaj tranĉilon kaj trinkante samtempe brandon kun iu ino (ĉu hm!) ĉe tablo kun kvar piedoj, farita el ligno, en ĉambro numero kvin de hotelo N.

Bedaŭrinde mankas la spaco en ET, por doni ankoraŭ pluajn detalojn, kiuj montras la nebran necesecon de modernigo de nia „kara“ lingvo. Sed ĉar nia manuskripto ne jam estas presita, ĝi povas ankoraŭ esti pliampleksigata, kaj mi petas la samideanojn, kiuj interesiĝas pri nia triumfo de Esperanto, ke ili sendu al mi sian proponojn detalan. Iu pli logike, kaj ju pli komplete, kaj ju pli detale, des pli bone! Tio estu nia devizo por savi la mondlingvan movadon.

**Ho, mia plum'!**

Ho, mia plum', moviĝu pli rapide:  
De rima vort' finiĝu la volum' —  
Atendas vane gloron mi avide ...  
Ho, mia plum'!

Ho, mia plum'! Post longa skrib' kaj knabro  
Mi timas: glori' disigis kiel fum' ...  
For flugu Parisota do rimaro  
Ho, mia plum'! ... Joŝo.

**Malvera Verajo. \***

Ĉe la bordo de l' Saharo  
Kaj la rando de la maro  
Migris flumrapide iam  
Pramajuna knabo ĉiam.

Brule malvarmigis suno,  
Nigre eklumigis luno. —  
Li glitumis sur sableroj,  
Ebrigiis per kaferoj.

**Hispanio.**

Paroladoj kaj propagandaj vesperoj okazas en la tuta lando, bedaŭrinde ne pro Esperanto, sed por aliaj celoj. Detalojn ni esperas povi komuniki en iu venonta numero, se la loko sufiĉos.

**Esperantistoj loĝantaj ĉe la Norda Poluso?**

La Nordpolusa esploristo Christiansen rakontis al intervjuisto, ke ĉe la Norda Poluso li trovis homojn, kiuj parolis strangan, sed belan kaj bonsonan lingvon. Ĉar la esploristo ne sciis pliajn detalojn pri la lingvo, oni supozas, ke la ĉenord-polusanoj parolis Esperanton.

**Pollando.**

En Wargoszcz estas fondita Rondo „Konkord-ego“, kiu celas la efektivan interparigon kaj unuigon de ĉiuj tutpollandaj gesamideanoj („ge“ signifas ĉiujn naciojn, religiojn, seksojn, agojn ktp.). Tutpollanda Gekongreso okazos tuj post eblig.

**La Verda Partio en Ruslando**

staras antaŭ gravaj decidoj. Kiel ni sciigis, ekzistas konspiro inter la verduloj por devigi la ruĝan registaron de Lenin kaj Trocki al eksigo. Dev-jatin estas destinita fariĝi diktatoro de la estonta „Verda Imperio“, kiel oni intencas nomi la nunan „Sovjetan Respublikon“. En tiu ĉi nova imperio ne plu ekzistos ruĝuloj, sed nur verduloj. Esperanto estos la sola lingvo uzata en la imperio; eĉ la rusia lingvo estos forigita.

**Grava ĵurnalo en Usono gajnitaj por Esp.**

En la granda ĉiutaga ĵurnalo „Sunday Herald“, aperanta en New York City, 64-paĝa, grandformato, troviĝis sur paĝo 22, kolono 11, linioj 87—95, artikolego pri droninta ŝipo „Esperanza“. Jen grava gajno por nia afero, ĉar la simileco de la nomo certe atentigos multajn legantojn de la ĵurnalo pri nia sankta afero.

**Japanlando.**

Proksiman semajnon estos publikigata la VI-a Komunikilo de la LKK por la XV-a, kiu laŭ decido de la XII-a okazos en Tokio, la ĉefurbo de nia lando. Ĝis nun alĝitis al la kongreso entute 320 japanoj kaj 0,05 eksterlandanoj.

**Recenzejo.**

**LIBROJ.**  
KOMPLETA LERNOLIBRO DE IDESPEROPŬK. De C. Manoli. Unua kaj sola eldono. Sufiĉe granda de la unua ĝis lasta paĝo. Eldonis eldonejo Multesma, Leipzig. Prezo: Unu Nobelpremio.

Jen fine la lingvo, kiu ni bezonas! Jen fine la libro, laŭ kiu oni povas lerni laŭ kiu oni povas instrui. Kiu ne jam scias, ke Volapük ne taŭgis? ke Esperanto estas tro simpla? ke ldo, kvankam maxperfekta, ne estas sufiĉe perfekta? Ĉiuj ni scias tion; sed nur la aŭtoro kuragiis diri ĝin malkaŝe. Jam delonge ni atendis vane novan proponon pri lingvo fine taŭga. Ni dankas al Manoli, ke li ĉesigis nian malpaciencon. Kion bonan ni ĝis nun vidis en aliaj lingvoj, tion la aŭtoro laŭ delikata kompreno kunmetis en sia verko. Pro modestece li ankaŭ ne forigis la malbonon. Do oni povas nomi ĝin verkon plej maxperfekta. Ĝi estas granda progreso kompare al la antaŭa verko de la sama verkisto, la terlibro de Valoccidendo Ni esperu, ke la venontaj projektoj en sama grado pliprekfikiĝu! (Ni. Ri. Du.)

**GAZETOJ.**

La Verda Ĵurnalo. Dekduobla numero por 1922, aperas hektografite kaj nur por interŝango. Certe la ĵurnalo forigas grandan mankon kaj tial estas salutinda kiel unu el niaj plej gravaj.

Berlina Esperantisto. Fine ĝi aperis. Nepra necesa! Internacia Revua Movado, Paris. Aperas de nun sub nova titolo Internacia Movada Revuo, ĉar la ĝisnuna nomo estas propraĵo de la Franca Esp. Asocio, kio momente ne ekzistas kaj tial ne povas konsenti al la novaj eldonantoj la uzadon de la ĝisnuna nomo. Stelista Esperantisto. Oficiala organo de Internacia Stelista Asocio (ISA). Espero Katolika. Jan. Vera Katoliko. Jan. Katoliko movanta. Febr. Katolika Katoliko. Jan. Interkatolika Pacigo. Kiam?

Tricenfunta graciino  
Estis lia kunulino.  
Dancis verve, je pasio  
Shimmy'n ŝi kun apatio.

Mute kantis senlingvulo,  
Starkuŝante en angulo  
De tutronda ubroplaco,  
Vekiĝinte ĵus pro laco.

Kara tion ĉi leganto,  
Certe ĝin ne komprenanto,  
Naĝu fra l aer' surtere,  
Vidu mem, ĉu estas vere!

A. Jo.

\* Kantebla laŭ melodio de la funebra marŝo de Chopin.

**Sekreta Amo. \***

Mia amo flamas al-  
Te tra la aero, bal-  
Daŭ mi vidos la ama-  
Tinson en la ĉiama  
Nobeleta „pyjama“.

Pensu nur, ke mi vizi-  
Tos ŝin per la nefizi-  
Kaj revadoj en dormĉam-  
Bro la ŝia; ĉar la fan-  
On respektas mi pro am'!

Babeor.

\* Tiu ĉi ĉarma aĵpoemo estas premita ĉe la VIII-aj Internaciaj Legomaj Ludoj 1921 en Corona.

**Atentigo.**

Por tiu ĉi numero la regula prezo validas nur ĉe antaŭmendo. Postmendojaj ekzempleroj kostas duoblan prezon.

